# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

2-a Kvaronjaro 1980 — N° 74

# GRAVA SUBITA BATO

# al NIMA GRUPO

KIAM LENTAIGNE TELEPHONIS AL MI POR ANONCI LA MORTON ~~6~~-je la 15a de MAJO ~~6~~ DE ROGER VOLPELIERE, MI ESTIS ABSOLUTE KONSTERNITA.

MI MULTE AMIKIĜIS KUN NIA AMIKO ĈAR LI ESTIS HOMO DE BONAJ KONSILOJ KAJ KUN LIA EDZINO FORMIS AĜEMAN ESPERANTISTAN PARON.

ĈU EN LA ESPERANTA-MOVADO, ĈU EN LA MONDCIVITANA ILI ĈIAM BATALIS KUN FERVORO KAJ EĈ MAKSIMUME DE SIAJ PROPRAJ FORTOJ.

OKAZE DE SIAJ PRELEGVOJAĜOJ TRA TUTA SUDFRANCUJO, ANTAŬ MULTAJ JAROJ, ILI KONTAKTIS NIAN ESPERANTO-MOVADON KAJ DE TIU TAGO ROGER VOLPELIERE ESTIS APUD SIA EDZINO POR ĈIUJ HOMAJ LABOROJ.

AL RENEE VOLPELIERE LA MEMBROJ DE LA FEDERACIO "LANGVEDOKO-RUSILJONO" PREZENTAS SIAJN PLEJ SINCERAJN KUNDOLENCOJN.

LA PREZIDANTO,
RENE LLECH - WALTER

---

La 13an Franca Kongreso okazos en PERPIGNAN de la 6a ĝis la 9a de Junio 1981.
Organizas ĝin la Kultura Esperantista Centro, 72 Av. Général de Gaulle , 66 000 PERPIGNAN.
Oni antaùvidas renkontiĝon kun hispanaj samideanoj.

R. LLECH-WALTER

# FRANCA KONGRESO 1981

# en PERPIGNAN (P.O.)

# PRELEGO DE LA PREZIDANTO



Karaj geamikoj,

Okazis du gravaj eventoj en nia Federacio, kiuj faris bonegan propagandon apud la oficialaj instancoj, la gazetaro kaj la publiko : dum nia lasta kongreso en Montpellier ni inaŭguris straton Zamenhof kaj la 26an de januaro de tiu ĉi jaro ni inaŭguris ankaŭ straton Zamenhof en Béziers.

LaMediteranea esperanto-semajno en Sète bone sukcesis.

3 kursoj funkcias ĉe la Universitato de la 3a aĝo en Montpellier

En Nîmes la debato pri iu lingvo por Eŭropo, dank'al S-ro Lesage kaj Ges. Volpelière permesis al profesoro Duc-Goninaz prezenti la problemon kaj solvon de elekto de internacia lingvo.

Nederlanda samideano Van Heugten prelegis en multaj urboj de nia Federacio sub la aŭspicioj de U.F.E.

Ekspozicioj en Nîmes,Perpignan,Castelnau,Centro de Pedagogia Dokumentado en Montpellier,prelegoj de D-ino Vierne en kuracista fako, de Amouroux en 2 Rotarioj, de mi mem en Kolegio Albert Camus, dum oficialaj horoj,permesis pli bonan konon de la internacia lingvo.

La aŭtuna kunveno de la federacia komitato en Sète donis okazon por interŝanĝo de ideoj kaj la preparado de diversaj laboroj.

En niaj diversaj grupoj la aktivuloj zorgas pri organiz dde kursoj kun obstino, ĉar la laboro ne estas facila, ĉar ĝuste la vivo estas tro facila : televido, aŭtomobilo permesas al ĉiuj : ĉu resti hejme,ĉu promeni eksterurben?

Malgraŭ la klopodoj de la nova estraro de U.F.E. kaj de la Varbado-Komisiono la nombro de la membroj malkreskis en Francujo; mi memoras ke iuj esperantistoj diris : oni devas ŝanĝi la homojn, kelkaj estas tro maljunaj. Sed ne estas afero de aĝo, estas afero de ago......

Ni devas rigardi vidalvide la problemojn de ĉiutaga vivo : ne per tro abunda sendo de cirkuleroj ni iros antaŭen.....

La sukceso dependas de nia propra laboro, la ĉefa afero estas varbi,varbi,varbi.

La tasko ne estas facila, oni devas havi multe da kuraĝo, pacienco kaj persistemo.

En Perpignan ni faris, laŭ la ekzemplo de nia kara amiko Lentaigne, " Esperanto à la carte" kaj kiam lernanto ne povas ĉeesti la semajnan kurson, li elektas tagon kaj horon.

Feliĉe, ni povis aranĝi kurson ĉiujn ĵaŭdojn je la tria horo posttagmeze pere de bonega esperantisto S-ro Boumal; li havas je la 3a kiel lernantinoj : profesorino de matematikoj kaj profesorino de kataluna lingvo kaj je la 4a juna liceano kaj plenkreskulino,kiu ne timas veni el Ille sur Têt, je 25 km de Perpignan.

Ni devas cele preferi la kvaliton al la nombro kaj tiamaniere, ni povis, en nia Centre, altigi de 3 membroj-abonantoj al 10 membroj-abonantoj; mi scias, ke en aliaj grupoj oni ankaŭ faris same kaj ni povis esperi, ke ĉe la fino de la jaro la membraro de nia federacio kreskos.

Estas la deziro de via Prezidanto.

Dankon !

*Renato LLECH-WALTER dum la malfermo*

*de la Federacia Kongreso en BEZIERS (13-4-80)*

# Regiona Jarkongreso ESPERANTO-FEDERACIO

Per aplaŭditaj bonvenigaj kaj stimulaj vortoj, S-ro Llech-Walter malfermis la jarkongreson de nia Federacio, kiu okazis en BEZIERS la 13-an de aprilo.

Pro ĉiujara renovigo de triono de la federacia komitato vakis la posteno de Ges-roj Angevin,Authier,Coquin,Terral kaj Amouroux. La koncernatoj estis unuavoĉe reelektitaj kun S-ro Pelletier anstataŭe de S-ro Coquin, kiu ne rekandidatiĝis.

S-ino Soulier(Nîmes) estis elektita kiel reprezentanto de la Federacio por la 72-a Nacia Kongreso kaj la diversaj rezultoj de la voĉdonoj pri U.F.E. TROVIĜAS POST TIU ĈI PROTOKOLO (kontrolis S-roj Boumal kaj Amouroux).

Ĉar la financa situacio de la Federacio komentita de S-ino Negron estas kontentiga ni decidis donaci 500,oo F al U.F.E. por la "fonduso-domo".

S-ro Lentaigne menciis, ke fulme disvendiĝis la 500 ekzempleroj de lia bonega verko "Kiel Diri ?" kaj la reeldono baldaŭ aperos.

Post la interdiskuto, S-ro Llech-Walter intencas proponi al U.F.E.,ke la Esperantista Kulturcentro de Perpignan invitos la venontan jaron nacian kongreson je la 1-a de majo-festotagoj.

Kelkaj intervenoj sekvis pri "Sudfrancia Stelo", kiu suferas je manko de kontribuaĵoj kaj lokaj informoj kiun D-ro Salan kompensas per rakontoj. S.F.S. aperas regule je la fino de ĉiu kalendara trimestro kaj la presotaj tekstoj devas esti ĉe D-ro Salan la unuajn tagojn de la lasta monato de ĉiu trimestro.

La sindonema prizorgantaro de S.F.S. konsistas el D-ro Salan (korektigoj kaj selekto de artikoloj), S-ro Frus (presado kaj dissendo) S-ro Raynaud (krucvortoj) kaj la tajpisto de la stenciloj.

Post la komuna tagmanĝo ni rekunsidis kaj prilaboris tekstojn por la nacia kongreso, troveblajn post tiu ĉi protokolo.

S-ro Amouroux atentigis pri la ebleco senpage ricevi "Eŭroforum" (Commission des Communautés Européennes, Rue de la Loi 200, B. 1.049 BRUXELLES), kiu kelkfoje pritraktas prilingvajn demandojn en la sino de la eŭropa komunumo.

Sekvis raporto pri la agado de la grupoj :

A L E S (S-ro RAYNAUD) : La grupo stagnas. Artikoloj en la loka gazetaro sen granda sukceso. Aktivado de juna studento de la Minlernejo, lerninto de Prof. Janton. En septembro alvenos juna instruistino ĝis nun en Mende.

B E Z I E R S (F-ino TERRAL) : La 26-an de januaro inaŭguro de Zamenhof-Strato kaj ekspozicio. La grupo konsistas el 30 membroj, inkluzive de simpatiantoj, kies deko partoprenas en la ĉiumonataj kunvenoj.

MONTPELLIER (D-ino VIERNE) :

Informado : Bone sukcesas la verda broŝuro de U.F.E. Artikoloj en la gazetaro. Pluraj ekspozicioj en Montpellier kaj Castelnau.

Instruado : 3 nivelaj kursoj en la Universitato de la tria aĝo dank'al kiuj ĉijare kreskis la membronombro de la grupo. S-ino CAPUS gvidas kurson en liceo. Konversacia kurso ĉe Centre International des Jeunes.

En Sète, de la 21-a ĝis la 29-a de septembro, samkiel pasintjare, okazos mediteranea esperantista semajno pri kiu volonte informas D-ino VIERNE, 5,Rue du Dr Roux,34 000 MONTPELLIER).

Esperantismo : La grupo havas propran jarbultenon. Gastigo de eksterlandanoj.

N I M E S (S-ino MOUNIER) : Multvizitita ekspozicio de Galerie Jules Salles. Baldaŭ ekspozicio dum unu semajno en la urba biblioteko. S-ino Volpelière gvidas kurson por kelkaj gelernantoj, prelegis en la liceo kaj intervenis en kunveno de mondcivitanoj.

S-ro Duc-Goninaz prelegis pri "Iu Lingvo por Eŭropo". D-ro SALAN brile trapasis sinsekvon de E-ekzamenoj inkluzive de la "Pedagogia Atesto" kaj, ĉiumerkrede, gvidas trihoran triagradan kurson por 5 gelernantoj.

LA CANOURGUE (S-ro HENIN pere de S-ro AMOUROUX) :
Pro ŝanĝo de datoj de la nacia kongreso duan fojon ne povis okazi la federacia kongreso en Mende kies grupo tamen tion deziris por stimuli la lokan movadon tiom pli, ke efikaj agemuloj jam transloĝiĝis (Aurillac kaj Zlès) tamen, esperebIe, por same entuziasme agadi.

PERPIGNAN - Esperantista Kulturcentro -(S-ro LLECH-WALTER) :
Publika prelego de S-ro Abecassis, Japano kaj Nederlandano. S-ro Llech-Walter prelegis en Liceo Albert-Camus kaj gvidas ĉiumerkredan kurson en Argelès-sur-Mer por 6 gelernantoj. Ĉiulunde kurso de S-ro Abécassis por 10 gelernantoj kaj ĉiuĵaŭde de S-ro Boumal por 4 gelernantoj.
U.S.C.M.--ESPERANTO (S-ro AMOUROUX) : Lernantino de la ĉiulunda kurso (4 gelernantoj) malfermis butikon pri estetiko kun E-nomo : Mirinda .Ĉiumerkrede kurso de S-ino Castets kaj S-ro Vialla por deko da geinfanoj. Ĉiuĵaŭde kurso de S-ro Amouroux por 3 progresemuloj. S-ro Amouroux estis invitita de du rotariaj kluboj, en Perpignan (18.X.1979) kaj Argelès-sur-Mer (07.II.1980) por ,post tag- kaj vespermanĝo, prelegdebati pri Esperanto.
Q U I L L A N ( S-ro REGNIER pere de S-ro AMOUROUX) : Artikoloj en la gazetaro. La 16-an de aprilo prelego en la junulardomo de Carcassonne por provi revivigi la lokan grupon.

---

Nia aŭtuna laborkunsido okazos en SETE dimanĉon la 28-an de septembro, la antaŭlastan tagon de la mediteranea esperantista semajno.
D-ro SALAN proponis, ke la venontjara federacia kongreso okazu en NIMES.
S-ro HENIN estas komisiita prizorgi federacian libro-servon kaj disponos pri 1.000,oo F. La grupoj sendos al li titolojn de aĉetota materialo.
D-ino VIERNE raportetis pri tri interesaj informoj :
- en la flavaj folioj (laŭprofesia enlistigo) de la venonta telefonlibro de Hérault aperos listo de "profesoroj pri E" en Montpellier - jam ekzistas en Béziers kaj Perpignan-.
- en Belgio kaj Svisio por "disques des auditeurs" esperantistoj petis ke Esperanto-diskoj estu aŭdeblaj pro la belsono de la lingvo.. Radiostacioj tiajn aĉetis.
- en "Critique" (aŭgusto/septembro 1979) ĝenerala revuo de francaj kaj eksterlandaj publikaĵoj, aperis 14-paĝa artikolo de la Montpellier-a Esperantisto Jean-Claude MICHEA : "Kial venkis Esperanto?"
Tiel finiĝis nia federacia jarkongreso kun dankoj al la organizintoj kaj partoprenintoj.
Ĝis revido en SETE la 28-an de septembro.

Protokolis Jean AMOUROUX

CARCASSONNE :
La 16-an de aprilo S-ro Pierre REGNIER (QUILLAN) aranĝis prelegon kaj ekspozicion en la Junulardomo pere de la informmaterialo de nia amiko LENTAIGNE.

Aperis artikoloj en la gazetaro sed la publiko resumiĝis al 6 personoj inter kiuj tamen troviĝis tri izolitaj geesperantistoj dank' al kiuj esperebIe iam revivos la loka grupo. Federacia kunveno en CARCASSONNE certe tre efikus.

# "SEPDEK JAROJ SUB LA VERDA STELO"

Post "......el la kara infaneco" kaj "kontraŭflue" ĵus aperis la tria parto de la triptika aŭtobiografio de VALO (plumnomo de nia samideano Raymond LAVAL).

La tri volumoj (100 + 100 + 96 paĝaj) enviciĝas en la broŝurservo de S.A.T. post lingva kontrolo de ties literatura komitato kies sekretario ĝuste estas R. Laval.

En "...el la kara infaneco", per modela lingvaĵo kaj eleganta stilo, Valo rakontas pri siaj 14 unuaj vivojaroj (1900-1914) kaj,male al sia antaŭparolа supozo, ke "Kiun povus interesi tiuj sencencaj babilaĵoj de kadukulo ? tiuj sencelaj zigzagaj rakontoj ?tiuj sensukaj remaĉitaĵoj? Kiun ja, krom mi sola?" estas tipo de libro interesa ne tiom (sed ĉu certe ?) pro la rakontitaj faktoj sed pro la talenta rakontmaniero. Nostalgio pri io intima kaj kara,neniam plu revenonta, naskas bone resentitajn kaj emociplenajn kaj la merito de tiu libro estas, ke la aŭtoro sukcesis ilin komuniki al la leganto.

Per verkistaj penikaplikoj,Valo mozaike pentras ĉiam freŝajn xxxx rememorojn pri sia cevena familio, la vidindaĵoj kaj tradicioj de sia kara Aleso kaj Ĉirkaŭaj regionoj kaj eĉ gvidas la leganton ĝis unumonata vojaĝo en Tunizo.

Post kvieta kaj kara infaneco jen la kontraŭfluo ! Ĝi daŭros iom pli ol kvar jarojn (1914-1918).

"Kontraŭflue" estas eltiraĵoj, lingve plibonigita, el taglibro de la aŭtoro,tiam 14-jara knabo,kiu,ĝis 18-jara maturiĝo, travivis la grandan turmenton de la tiel nomata "Granda Milito".

En si mem la titolo simbolas la persistan rezistadon de la adoleskanto al la kontaĝo de la naciisma kaj militema deliro.

Eĉ se "sepcent kilometrojn for de la plej proksima batalfronto, neniam aŭdinta kanonon aŭ bombojn, neniam vidinta en la ĉielo la minacon de malamikaj flugmaŝinoj", li skrupule notis sur nun flaviĝintaj kajerfolioj faktojn pri sia ĉiutaga vivo, siajn purajn amosentojn, rakontojn de revenintaj batalintoj (interalie la patro).Ciam kun emocio li ... salutas la memoron de li konataj militmortitoj, kio kondukas lin al la lasta frazo de la libro : "Kia stultegaĵo, la milito !).

Li ne preteratentis la morton de D-ro Zamenhof, la 14-an de aprilo 1917 kaj, vibre omaĝante la aŭtoron de Esperanto, li sin demandis : ĉu la postmilitaj esperantistoj reprenos la vokon de Gabriel Chavet en la solena malferma-kaj ferma kunsido de la Deka Universala Kongreso en Parizo, la 2-an de aŭgusto 1914 ? : "Vivu ĉiam,malgraŭ ĉio, la interna ideo de Esperanto".

Ne atendinta la respondon de la esperantistoj al la voko de Chavet, R. Laval ĵuris al si kaj certis, ke multaj en la mondo same ĵuris "Se mi postvivos tiun ĉi teruran epokon, mi ĉiam restos fidela al la memoro de Zamenhof kaj al lia heredaĵo"..

Jam de pluraj jardekoj R. Laval fidele respektis sian moralan kaj noblan kontrakton kaj, entute "Sepdekjaroj sub la verda stelo" ja ne estas tiel ordinara en nia movado!

Tiu ĉi tria originala verko de Valo estas por ni aparte interesa pro la fakto, ke ĝi tuŝas ankaŭ la Esperanto-movadon en nia regiono.

Laŭ longe de tiu fidela raporto pri sepdekjara esperantista vivo li rememoras la "epizodojn el la longa sperto de ordinara esperantisto" kiu transiri de la neŭtrala al la/neŭtrala movado. / ne

Tra la legado du ĉefaj trajtoj de la personeco de R. Laval povas resumiĝi al lojaleco je konvikoj kaj fideleco je la plej pura zamenhofa esperantismo neniam deflankiĝinta kaj esperdona.

La tri broŝuroj meritas trovi bonan lokon en ĉiu "verda" bretaro, esperante ke iam aperos kvara de iu kompetenta recenzisto, kiu analizos la verkistajn,tradukistajn,artikolistajn talentojn de Valo, kiuj,ligitaj al lia zamenhofa samideaneco, modele kontribuas por ke plufloru Esperanto.

Recenzas Jean AMOUROUX

# Regiona Jarkongreso en Beziers la 13-4-80

Reprezentanto de la Federacio dum la 72-a Nacia E-Kongreso en PARIZO : S-ino SOULIER (Nîmes)

Rezulto de la voĉdono por U.F.E. :

rajtis voĉdoni : 47 voĉdoni : 23 validaj voĉdoniloj : 23

agadraporto U.F.E. 1978/1979 : jes : 21 sindeteno : 2

financa raporto 1978/1979 : jes : 21 sindeteno : 2

buĝeto 1980 : jes : 21 sindeteno : 2

Komitato U.F.E.- La nombroj indikas la aprobojn -

AMOUROUX (20), BERNARD (23), DENIS (15), DESPINEY (21), GONIN Hervé (23), GONIN Raymond (18), HENRY (23), LEGER (22) TEXIER (23), VIERNE (19).

Kongresaj rezolucioj por la nacia kongreso :

La membroj de la Federacio Langvedoko-Rusiljono :

a) gratulas al U.F.E. pro la nova vizaĝo kaj enhavo de " Franca Esperantisto ";

b) ĉar ĉijare estas la "jaro de la nacia hereda posedaĵo kaj ĉar la kulturo estas ankaŭ la rezulto de lingva realigo apartenanta al tiu hereda posedaĵo, prioritato devus esti, protekti niajn enlandajn kulturojn kontraŭ la lingvaj subpremadoj kaj la uzo de Esperanto kiel internacia kaj neŭtrala perilo.

(unanime aprobita krom unu sindeteno)

c) sugestas ke U.E.A., pere de sia komisiito pri sportoj, agadu en la kadro de la organiza komitato de la Olimpiaj Ludoj.

(unanime aprobita krom unu sindeteno)

--o---o-----o-------o---o--o-



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**

Dépot Légal : 2me Trimestre 1980

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes